

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

Jarabono : 40 fkoj

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MAJO - JUNIO - JULIO - AUGÛSTO

1979 - 3-4

KULTURAJ KAJEROJ

1979 MAJA - JUNIO - JULIO - AŬGUSTO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo — A. Frangeul

Djerba, en la Tunizia Historio

Je via sano ! — A. Mollison

Mi estas tie — J. D. Freeman, trad. E. Motillon

El « La notlibroj de Majoro W. M. Thompson » — P. Daninos, trad. R. Imbert

Mallonga vojaĝo al Brazilo — B. Golden

Falsa soleco — A. Weöres, trad. L. Tihanyi

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn.

El Grésillon

Iun tagon de printempo 1951 gesinjoroj Micard babilis kun geamikoj. Ili rakontis, kiom malfacile estis trovi taŭgan lokon por okazigi la somerlernejon ĉiujare organizita de la Grupo de Esperantistaj Edukistoj. Efektive ŝajnis tiam, ke neniu urbo povos gastigi ĝin dum la sekvanta somero. « Sed, respondis unu el la amikoj, kial vi serĉadas novan lokon ĉiujare ? Estas nun domo vendota en la apuda urbo ; aĉetu ĝin. Tio solvos viajn problemojn ».

Jen estis la naskiĝo de nova ideo : Esperanto-Domo posedata de la esperantistoj. Sed ĉu tiu domo taŭgos ? ĉu la ideo plaĉos ai la esperantistoj ? Ĉu ili povos aĉeti domon ? H. Micard vizitis la domon kaj antaŭ ol komenci la traktadojn kun la posedantoj, li sin turnis al 150 el siaj esperantistaj amikoj per la jena cirkulero.

CIRKULERO AL LA ESPERANTISTOJ

— Esperantisto skribis al mi antaŭ kelkaj semajnoj : « Via somerlernejo estas tre bona afero ; sed, kial ne fari plurajn ? Necesus almenaŭ unu, eĉ du, por la laboristoj, kiuj havas pagitajn feriojn. Kial ne estas organizitaj studperiodoj por la instruistoj ?

La GEE-anoj konas la respondon al tiuj demandoj. Ili scias ke la organizado de somerlernejo estas pli kaj pli malfacila, ĉar ni ne havas propran domon, beletan, komfortan, en agrabla regiono en kiu ni povus organizi, laŭ plaĉo, somerlernejojn, seminariojn, studperiodojn, kongresojn, ktp... Tio estas revo. Sed tiu hieraŭa kaj hodiaŭa revo povas iĝi mogaŭa relaĵo se ni, ĉiuj kune, vere volas.

Estas vendota en Sablé bieno, kiun mi vizitis, kaj kiu ŝajnas al mi tute taŭga, post minimumaj necesaj plibonigoj, por gastigi 50 personojn. Bela domo, bela parko kontraŭ publika ĝardeno, 100 metrojn de la naĝejo, 200 de la urbodomo.

Mi antaŭvidas la kontraŭdiron : Sablé estas nek ĉe marbordo, nek en montaro. Ĝi ne estas alloga. Ĉu vere ? Kion ni postulas en esperantista renkontiĝo ? Unue esperantistan etoson : tion ni havus. Agrablan kaj komfortan domon : tion ni havus. Facile atingeblan regionon : ni havus ĉar la urbo situas sur la granda fervoja linio Paris-Quimper, kun halto de rapidaj trajnoj. La urbo plibeliĝas jaron post jaro. La rivero Sarthe donas al ĝi agrablan aspekton. Ĝi posedas modernan naĝejon. Estas eble promenadi en tre verda ĉirkaŭanta kamparo. La marbordo situas nur je ducent kilometroj kaj la Loire kasteloj je 80 kilometroj.

Mi povas aserti, ke post plibonigoj, la domo estos agrabla kaj ankaŭ la tuta loko : ripozo en la parko, promenadoj en la kamparo, banado, fiŝkaptado, ekkursoj, pilkludo, teniso. Certe ni povus trovi similan eble pli taŭgan, domon, sed estas grava punkto konsiderota : la estro loĝu proksime. Mi esperas fariĝi pensiulo post unu jaro. Eble mi povos disponi pri la necesaj jaroj por firmigi la aferon. Tie mi trovos seriozajn helpojn. Mi estas certa, ke niaj amikoj en Angers, le Mans, Nantes, ne ŝparos sian helpon. La afero estas tre grava por la tuta esperantistaro. Ĉu ĝi estas realigebla ? Ĉu ĝi povas vivi ? Tion ni nun vidos.

SEKVOTA

Esperanto tra la Mondo

KIAM DANA AMBASADORO ENKETAS

Dana progresiva partio proponis en la dana parlemento ke la tiulanda reprezentanto en Unuiĝintaj Nacioj sugestu interŝtatan konvencion pri la enkonduko de Esperanto en lernejoj.

Por tio, la dana ambasadoro en Budapeŝto renkontis Prof. Istvan Szerdahelyi, respondeculo de la oficiala esperanto-fako en la universitato de la hungara ĉefurbo.

La ambasadoro deziris kolekti informojn pri la eblecoj de la internacia lingvo.

KONFERENCO DE SCIENTISTOJ EN BRAZILO

Dum Aprilo, okazis en Marilia (Brazilo) la dua internacia konferenco pri la lingvaj problemoj en scienco. Tiu konferenco kunigis esperantistajn sciencistojn el diversaj landoj.

Dum kvin tagoj da prelegoj kaj diskutoj, specialan atenton ricevis la lingvaj problemoj de evolulandoj kaj la konferenco, inter alie, proponis enkondukan lernadon de la internacia lingvo en la sciencaj medioj.

ESPERANTO KAJ ROTARY

La franca revuo de Rotary-kluboj, « Le Rotarien », en la numero de Majo 1979, dediĉis 20 paĝojn al Esperanto, kun pluraj fotoj. Pluraj esperantistoj, anoj de Rotary, komunikis propran sperton pri la uzo de la internacia lingvo, por korespondi kun eksterlandaj amikoj. Inter la diversaj artikoloj, estis tekstoj en Esperanto (eĉ kun traduko en anglan lingvon).

Ni memorigas al niaj legantoj ke ekzistas « Rotaria Internacia Esperanto-Amikaro de Rotarianoj » (I.E.A.R.). Adreso : G. Leon Smith, Kinburn, Egham Hill, Egham, Surrey, Britujo, Tw20 UBD.

LA KORESPONDAJ KURSOJ EN POLLANDO

Artikolo en la revuo « Esperanto » alportis informojn pri la relative granda disvastiĝo de la perkorespondaj kursoj de Esperanto en Pollando.

La propagando por tiu kurso estas ligita al intensa informa laboro ĉefe direktita al multnombraj ĉiuspecaj gazetoj.

La rezulto estas bonega ĉar, ĉiu-jare, alvenas al la sidejo de Pola Esperanto-Asocio, ĉirkaŭ 15-20 mil (!) leteroj kun informpetoj.

Miloj da personoj aliĝis al la perkorespondaj kursoj.

Nun, oni aranĝas somerajn renkontiĝojn por la lernantoj. Tiun jaron, la renkontiĝo okazos (samtempe kun dusemajna internacia kurso), de la 2a ĝis la 15a de Septembro. (Pola Esperanto-Asocio, str. Jasna 6, PL-00-013 Varsovie).

ASOCIO POR FILOLOGOJ

Internacia Unuiĝo de la Filologoj-esperantistoj havas nun 138 membrojn en 26 landoj. Ĝi eldonas kvaronjaran bultenon : « Filologo ».

Adreso : I.U.E.F., Poŝtkesto 66, BG-1000 Socia, Bulgarujo.

KUNLABORAJ RILATOJ INTER U.E.A. KAJ ORGANIZO DE AMERIKAJ ŜTATOJ

Organizo de Amerikaj Ŝtatoj kaj Universala Esperanto-Asocio starigis formalan kunlaboron, precipe sur la kampo de kulturo kaj intelektaj interŝanĝoj. O.A.Ŝ. tiel partoprenigos U.E.A. en sia laboro kaj interkonsiliĝos kun ĝi pri komune interesaj aferoj.

Tiel, U.E.A. estas rekonata kiel grava kultura kaj komunika organizaĵo en Ameriko.

UNIVERSALA KONGRESO EN BRAZILO

Oni scias ke la universala kongreso de Esperanto okazos en 1980 en Stockholmo. Estas nun definitive decidita ke la universala kongreso 1981 estos en la brazila ĉefurbo Brasilia.

POR DISVASTIGI ESPERANTON EN LA TRIA MONDO

U.E.A. aĉetis mil ekzemplerojn de la konata lernolibro « Privilegia vojo al lingvoscio : Esperanto » de Vilho Setälä kaj sendis ilin al tridek landoj de la Tria Mondo.

— Aktivas nun grupo de junaj entuziasmuloj por starigi kernon de esperanto-movado en Sirio (en la ĉefurbo Damasko). Se vi povas, iumaniere, ekzemple per sendo de materialo aŭ libroj, helpi ilin, rilatu kun : M. Gassan T. Mausily, 7 Maussily Bldg., Str. Omar Ibn Al-Kattab, Mal'ab, Hazra'ah, Damascus, Sirio.

NOVA LIBRO

« Aniaro » de la svedo Harry Martinson (literatura Nobel-premiito 1974). Traduko de Bertil Nilsson kaj W. Auld (174 paĝoj). Poezia romano, eposo pri la sorto de la homaro, en la kadro de fantazia spacŝipo.

LA PUPTEATRA FESTIVALO 79 EN ZAGREBO

La tradicia Pupteatra Internacia Festivalo okazos ĉijare de la 4a ĝis la 7a de Oktobro, en Zagrebo. Samperiode (4a-10a de Oktobro), ankaŭ en Zagrebo, Internacia Infana Renkontiĝo.

Informas : Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, Pf. 499, YU 41000 Zagreb, Jugoslavio.

POLA MONERO KUN LA PORTRETO DE ZAMENHOF

Estis emisiita en Pollando nova monero de 100 zlotoj kun portreto de D-ro L. Zamenhof kaj la datoj 1859-1917. Sur la alia flanko estas la pola blazono (aglo).

Tiu monero aperis en la serio : « la grandaj poloj ».

ĈINA POETO REAKTIVAS

Konata ĉina esperantisto, poeto, S-ro Armand Su, estis arestita en 1968 kaj restis 10 jarojn en malliberejo pro « kontraŭrevolucia aktiveco » (inkluzive de poezia agado en Esperanto). En Januaro 1979, li estis deklarita tute senkulpa de la nova registaro.

Li, lastatempe publikigis artikolojn en gravaj ĉinaj ĵurnaloj pri Esperanto, artikoloj kiuj provokis lavangon de informpetoj pri Esperanto.

Itallingva traduko de poemoj de Armand Su baldaŭ aperos.

— Kurso de Esperanto denove okazas en la lingva instituto de Pekino por dudeko da partoprenantoj kaj alia kurso estas farita en la universitato de islanda studento (S-ro Ragnar Baldursson).


Djerba, en la Tunizia Historio

Komence de Paleolitiko, tagiĝe de kvaternaro, antaŭ ĉirkaŭ unu miliono da jaroj, la fosaĵo de Adjim ne ekzistis kaj Djerba estis duoninsulo ligita al Sudtunizio. Pro la tiama klimato, ĉi tie vivis bubaloj, zebroj, hipopotamoj, antilopoj kaj rinoceroj. La tiamaj homaj estaĵoj estis nur prahomoj, kiuj vivis sojle de grotoj kaj praktikis la plej primitivan industrion : la grandaj « bifaciloj », hakiloj el silika aŭ kalka ŝtono, havigitaj per perkutado.

En Meza Paleolitiko, la geografiaj kondiĉoj ŝanĝiĝas, la mezvarma klimato altiras ursojn, aprojn, cervedojn ; la iloj estas havigitaj per splitado. La « Homo Sapiens » aperas nur en la 9-a jarmilo, kio estas 5 000 jaroj pli malfrue ol en Eŭropo. Estas la raso de Mechta el Arbi, tute proksima de la Cro-Magnon-a. Tiuj « unuaj konkerantoj de Magrebo dissemiĝas de Gabes ĝis Atlantiko dum ĉirkaŭ 3 000 jaroj ».

En Neolitiko aperas civilizacio, malpli kruda. Estas la Kapsia civilizacio (Kapsa estante la antikva Gafsa), kiu postlasis klingojn kun malaltigitaj tranĉrandoj, ĉizilojn, silikilojn triangulajn aŭ trapezoidajn sed precipe « Helikejojn » entenatajn en dikaj cendro-sedimentoj. Tiuj Kapsiaj tavoloj (altaj je 30 cm ĝis 3m., longaj je 10 ĝis 100 metroj) entenas bruligitajn ŝtonojn ; tiuj ŝtonoj varmigitaj ĝis tre altaj temperaturoj, servis por kuirado aŭ por radii la varmon. En tiuj tavoloj, oni precipe trovis, milionope, helikoŝelojn kompletajn aŭ dispremitajn. Tute apude oni ankaŭ trovis restaĵojn de fajrejoj kaj kabanoj. La miloj da Helikejoj en tuta Tunizio, kaj la kelkaj centoj en la regiono de Gafsa kaj Tebessa, pruvas ĉi-tiean eksterordinaran koncentradon da loĝlokoj. La Kapsiano estis kontinentulo, kiu neniam atingis la maron. Li estis malnomado, kiu praktikis la kulton de la mortintoj. Li kelkfoje ĉasis la dikan ĉasaĵon kaj prefere nutriĝis je ronĝuloj, batrakoj, reptiloj kaj helikoj. Ĉie, sur la ŝtonoj de liaj grotoj, liniaj desegnoj akompanas besto-pentraĵojn kaj homajn reprezentaĵojn, egalnombrajn. Pafarkistoj postkuras cervarojn ; viroj kolektas lignon kaj mielon Ili jam anoncas la neolitikan agrokulturanton. Tie ĉi oni retrovis kolierojn el strut-ovoj ornamitaj je geometriaj desegnoj. Tiuj strut-ovoj estis ankaŭ ujoj por tiu loĝantaro, kiu ankoraŭ ne konis la potaĵon. La Kapsiano uzis la homajn ostojn, por fari ilojn, ornamaĵojn aŭ fetiĉojn ; fetiĉoj estis tiuj segitaj pendeblaj mandibloj ; trofeo estis tiu kranio tranĉita nivele de la frunto kaj kies unu incizivo, falinta post la morto, estis anstataŭigita per homa falango.

La 4-a jarmilo alportis gravajn ŝanĝojn. Novaj scioj, novaj teknikoj naskiĝis kaj perfektigis : polurado de la hakiloj kaj adzoj ; bifaca hakado de la sago-pintoj ; permana modlado de la ceramiko ornamita je fingro-spuroj kaj entranĉoj ; malsovaĝigado kaj bredado de la bestoj ; kaj agrokulturo. Al la plenaera vivado sekvis vivo en grotoj aŭ en subrokaj ŝirmejoj. Estis surloka evoluado. Sed ankaŭ evoluado ŝuldita al invadoj. Tiuj invadoj venis el Saharo kaj tra Saharo el Orientegiptujo. Tiuepoke, en Saharo disfloris neolitika riĉa civilizacio. Sed ĉirkaŭ la 3-a jarmilo, senakvigado forpuŝis la Saharajn Nomadojn al Sudtunizio. Tiuj ĉi miksiĝis kun la Kapsianoj por formi novan etnon. Tiuj, kiujn Grekoj nomis Libianoj kaj kiujn, poste, oni nomis Berberoj (Barbarus), estis la posteuloj de tiu nova etno. Ili nomadis kun siaj brutoj serĉe al paŝtejoj kaj ĉasaĵoj. Ili fabrikis krudan potaĵon, ilojn el ligno kaj ledo. Estis la Fenicoj, grandaj vojaĝantoj, kiuj instruis al ili la bronzarton kaj enigis ilin en la Historion.



DJERBA - LA INSULO DE LA LOTOFAGOJ

En kvaternaro, la falego de la Adjim-fosaĵo transformis Djerba en insulon.

De ia plej antikvaj tempoj, tiu insulo estis vojkruciĝo, kie renkontiĝis, miksiĝis, alfrontiĝis la invadantoj venintaj el Centrafiko, same kiel el la plej malproksimaj Mediteraneaj landoj. Ĉirkaŭ -1500 la Egeaj vojaĝantoj alportis al Djerba la kulturadon de la olivarbo kaj la tornilon de la potisto. Ĉirkaŭ -1200 (dum la Helenoj elportis la Dorianajn invadantojn) la Fenicoj estris la maron kaj ŝipis ĝis Gibraltaro, kie ili instaliĝis am-

baŭflanke de la markolo. Ili fondis la urbon Utique, en la golfo de Tunizio. Estis etapoj al la fabela Tarŝiŝo, kaj sur la maraj vojoj, kiuj kondukis al la Hispana arĝento, al la Bretonia kaj Kornvala stano, al la Sardia kupro, al la Sudania kaj Gvinea oro.

Estas precipe en -814 (sekve al asiria minaco sur la fenicia ĉefurbo Tir-o, kaj sekve al internaj familiaj kvereloj), ke la fenicia Princino Didon-a kondukis parton de la Tir-anoj en Tunizion, kie ili fondis la ĉefurbon Kartago « la nova ĉefurbo ». La legendo rakontas, ke tribo-ĉefo akceptis la migrantojn ; li bonvolis, ke ili instaliĝu sur grundo, « kiun povus kovri bovido-felo ». Didona trančis tiun felon en tiel fajnajn rimenojn, ke la havigita rubando ĉirkaŭis grundon sufiĉe grandan por konstrui tutan urbon. Ŝia morto estis ne malpli spektinda. Sudlanda ĉefo volas edziĝi kun ŝi. Didona, fidela al sia mortinta edzo, preparas grandan feston, kaj ofere al la dioj, ĵetas sin en la brulantan ŝtiparon.

La Kartaganoj kulturis la viton, la oranĝarbon, la granatarbon. Ili sciis grefti la sovaĝajn olivarbojn, kaj 2 jarcentoj pli poste Hannibal plantigis multajn olivarbojn laŭlonge de la Tunizia marbordo, kaj certe en Djerba. La enormaj ĵaroj transportis la oleon de Zita (la nuna Zarzis), kies fenicia nomo signifias « oleo ». La Kartaga agrokulturo mirigis la Romianojn, kiuj latinlingve tradukis la Traktaĵon de la agronomo Magron.



LA INSULO DE LA LOTOFAGOJ

Laŭ Victor Berard, kiu studis la periplon de Uliso, Odiseado estas la vojaĝo, ĉirkaŭ -800, de fenicia navigisto. Tiele parolas Uliso : « Sed, okazas, ke, ĉe la turno de la kabo Malée, la fluo, la hulo kaj la Borea vento fermas al mi la markolon kaj la Citero-havenon. Tiam, dum 9 tagoj, la morto-ventoj kunportas min sur la Fiŝ-Maro. La deka tago metas nin sur la bordon de la Lotofagoj ; ĉe tiu popolo, kies nutraĵo estas nura floro. Oni alvenas, oni elŝipiĝas, oni iras ĉerpi akvon kaj senprokraste miaj homoj preparas la manĝon sub la flanko de la ŝipoj. Kiam oni satigis soifon kaj apetiton, mi sendas tri el miaj homoj esplori la lokojn. Sed, apenaŭ sur la insulo, miaj senditoj ligiĝas kun la Lotofagoj, kiuj, anstataŭ mediti ilian morton, ilin provizas je lotoj. Nu, tuj kiam ili gustumis tiujn mielo-fruktojn ili ne plu volas reveni. Mi estas devigata perforte ilin revenigi, tute plorantajn, kaj ilin enĉenigi sub la benkoj, funde de ilia ŝipo. Rapide mi enŝipigas ĉiujn miajn homojn kaj senprokraste, ke niaj ŝipoj ŝipiru ! »

Estas vere, ke Uliso kaj liaj kunuloj malofte renkontis tiel akceptemajn loĝantarojn !

La Lotofagoj certe ekzistis. La antikvaj aŭtoroj ilin lokis sude de la Malgranda Sirtujo (la aktuala golfo de Gabes), en tiu Djerba, kiu portis sinsekve la nomon de sia ĉefaj urboj : Phla, Meninx, Giira, Gerba (antikva nomo de Houmt Souk). Kio estis tiu fama Loto, kiu forgesigis zorgojn, ĉagrenojn, familion kaj patrujon ? Botanike la Loto ekzistis. Herodote, Polybe, Pline ĝin priskribis kaj komparis al daktilo, al figo, al mirto ; frukto tiel dolĉa, ke popolo prenis ĝian nomon.

S-ro E. Blanc pensas, ke tiu loto estas jujubo. La jujubujo ne plu ekzistas en Djerba, sed oni povas vidi unu unikan jujubujon en Tozeur. Tamen tiu forgeso-frukto estas poeta alegorio, kiun kreis Homero, kiel la greka mitologio kreis la Leteon, tiun forgeso-riveregon.

En sia historia pasinteco, riĉa je eventoj ofte kruelaj, Djerba konis Or-aĝon. Pro sia pozicio, la insulo estis grava haltejo por la Kartaga komerco kun la riĉa afrika kontinento. La karavanoj alportis negrajn sklavojn, oron, eburon, felojn, strut-ovojn kaj plumojn ; kaj reiris kun oleo, vinoj, fruktoj, sekigitaj fiŝoj, plumojn potaĵoj, ŝtofoj riĉe tinkturitaj.

Tial la Romianoj deziris instaliĝi en Djerba.

Jam en la 6-a kaj 5-a jarcentoj, ant.K., la Grekoj forĉasis la Kartaganojn el iliaj kolonioj (kiujn ili estis instalintaj en Sardujo, Sicilio kaj Korsikujo). Tiam la Kartaganoj plifirmigis sian pozicion en Tunizio mem, ĝis Sfax. Pli sude la Berberaj Princoj gardis sian sendependecon.

En la 3-a jarcento, ant K, Romo atakas la Kartaganojn. Sekve al la tri Punikaj militoj (264-241) (218-201) (149-146) kaj, malgraŭ Hannibal kaj lia ekspedicio tra Pireneoj kaj Alpoj, Romo detruas Kartagon kaj instaliĝas en Tunizio, kiu iĝas « Africa », Romia Provinco. Iom post iom, Romo instalas sian pezan « Pax Romana ». En Djerba ĝi intensigas la kulturadon de la olivarbo, kies oleon ĝi bezonas por siaj lumigiloj. En Meninx tinkturejoj eltiras el la mureko la ruĝan


purpuron, kiu servas nur por la vestoj de la Imperiaj Altranguloj. La fiŝoj plej abundis en tiu Fiŝ-Maro ; kaj sekigitaj fiŝoj kaj peklaĵoj estis senditaj al la kontinento kaj al la nova Kartago, kiun Romo ĵus rekonstruigis.

En la tuta Tunizio kaj ĝis la limoj de la nomadaj Saharaj triboj Romo instalis militajn postenojn, kiuj ebligis la kontroladon de la pasejoj, la protektadon de la akvo-punktoj, la transsendon de la optikaj signaloj, la protektadon de la kulturoj dum besto-migrado. Tiuj postenoj atestis la potencon de Romo ĝis ekstremaĵo de tiuj « solitudines Africae ». Estis Tisavar (la nuna Ksar Rhilane), kiun uzis la kolumno Leclerc en 1942. Tibubuci, kies cisterno entenis 60 000 litrojn da akvo ; Bezereos (Bir Rhezen) sude de Tebaga, okcidente de Tatahouine. Al tiuj kampadejoj aldoniĝis fortikigitaj farmoj, sude de Gafsa, okcidente de Metlaoui, kaj hodiaŭ uzataj de la Nomadoj. Vojoj kun siaj militaj kolonetoj, kaj siaj ĉenoj de optikaj signaloj atingis la ŝotojn, ilin trairis aŭ ĉirkaŭiris ; ĉar Romo timis la komunan agadon de la montaraj, stepaj kaj Saharaj Nomadoj, ĝi etendis sian gardadon ĝis Si Aoun kaj Guadames.

Pro komerci kun Zita (Zarzis), la Fenicoj konstruis 6-kilometran ŝoseon inter Djerba kaj la kontinento. La Romianoj ĝin plibonigis kaj ili aranĝis en ĝi aperturojn, en kiuj ili instalis fulilojn, kiuj funkciis dank'al la tajdo. Tiuj fuliloj estis la antaŭuloj de niaj modernaj tajdo-movaj uzinoj.


La Romia okupado daŭris 6 jarcentojn. En 439 la Vandaloj, venintaj el Baltiko kaj ĉirkaŭirinte Hispanujon, ekokupas Kartagon. Malfeliĉa periodo « dum kiu la fumanta Afriko sinkis sub la flamoj ». En 534 bizanca armeo okupas Kartagon kaj konstruas preĝejojn kaj bazilikojn, kaj luktas kontraŭ la Berberoj. En 647 alvenas la Araboj. En 670 ili konstruas Kairouan : sankta urbo ,foiro kaj milita posteno. Ĝis 703 la Berberoj ,sub estrado de la Principino Kahena, konstraŭstaras al la Araboj. Sed, en 711, Araboj kaj Berberoj alianciĝas por konkeri Hispanujon. En 732 ili estas en Francujo antaŭ Poitiers.

Unu religia sekto, la « Kharedjismo » estas adoptita de la Berberoj kaj de la Djerba-anoj. Por Djerba komenciĝas neĉesan 7-jarcentan luktón por defendi sian sendependecon : religiaj civitanaj militoj sed ankaŭ rezistado kontraŭ la atakoj de la kristanaj Princoj. Dume diversaj familioj estras Tunizion : Omeyyadoj, Abbasidoj. En la 9-a jarcento, la Aghlabidoj igas Tunizon ĉefurbo. Tiu 9-a jarcento estas paca, prospera, brila. En 909 invado de la Kabiliaj Berberoj, kiuj trudas novajn ĉefojn : la Fatimidoj, kiujn anstataŭos la Ziridoj. En 1053-1057 nova invado : la Beni-Hilal estas pirataj triboj, kiuj venas el Egiptujo kaj falas sur Tunizion « kiel armeo de lokustoj ». Paco kaj prospero revenas kun la Almohadoj.



La kristanaj Princoj de Sicilio, Napolo kaj Hispanujo, dum jarcentoj luktis kontraŭ la Araboj .Jam en 1270 Luiso la 9a (Sankta-Luiso), organizis Krucan Ekspedicion en Tunizio. La Papo kaj Karolo la Kvina subtenas la kristanajn Princojn, kiuj deziras plue mastri Mediteraneon. En 1432-1510 la Hispanoj malsukcesas antaŭ Djerba. Je tiu momento la insulo ŝirmas la piratojn Dragut kaj Sinan Reys, kiuj alianciĝis kun Soliman, la Turkestro, kontraŭ la kristanaj Princoj. En 1560, la hispana reĝo Filipo la Dua perdas, antaŭ Djerba, sian ŝiparon kaj sian prestiĝon en Mediteraneo.

Sekve al la helpo alportita, la Turkoj instaliĝas, por tri jarcentoj, en Tunizio, kiu en 1880 pasas sub la Franca Protektorato. En 1957 Tunizio iĝas sendependa Respubliko.



JE VIA SANO !

Aleksandro MOLLISON

Estas parto de la psiko, ke ni strebas por reteni la vivon ; ni ĉiuj deziras longe vivi. Sed ĉu ni povas ŝanĝi la sorton ? Ĉu ni kapablas plilongigi la vivon ? La respondo, por la meza homo, estas emfaze, jes ! Kvankam en tempo de minaco la homo luktas pos vivteni, estas paradokse, ke li ofte ignoras la kaŭzojn de sano-difekto. Fakte, ŝajnas al mi, ke multaj homoj strebas, eble senpense, mortigi sin : pro tio li facile povus ŝangi la sorton.

Dum antaŭaj epokoj plej ŝatata sporto estis duelado, se la kunbatalantoj ne dediĉis sin al militado, kiu daŭris senĉese. Hodiaŭ militoj ja ankoraŭ okazas sed nun la homo jam trovis egale efikajn rimedojn por sinpereo. Tiujn rimedojn mi intencas diskuti : mallonge dirite, la homo per sia **vivmaniero** strebas mortigi sin. Almenaŭ tiu vivmaniero kondukas al morto pli frua ol necese. Do, multaj homoj, laŭ mia opinio kaj laŭ la opinio de fakuloj, povus etendi la vivolongon se ili nur ŝanĝus diversajn kondiĉojn de sia vivo.

Kiajn faktorojn mi signifas ? La ĉefaj estas korpa pezo, dieto, fizika ekzercado, tobako kaj alkoholo. Nu, mi scias, ke ekzistas multaj tezoj pri sano kaj morboj kaj etendado de la vivo. Unuj spertuloj diras, « Ne manĝu sukeron, uzu sakarinon ». Aliaj diras, « Ne uzu sakarinon ; tiu estigas kanceron. Prefere estu vegeterano ». Ĉu tiuj opinioj ĉiam konfliktas ? Ĉu eble eltiri sencon el la konfuzaj ideoj ? Mi jam faris detalan studon de la diversaj teorioj kaj statistikoj, kaj klaraj konsiloj elvenas el la amorfa amaso. Tiujn mi pritraktos por tiuj, kiuj sufiĉe interesiĝas.

PEZO KAJ DIETO

Vi, kiuj legas ĉi tiun artikolon, vivas en la tiel nomataj « evoluintaj » aŭ « civilizitaj » landoj. Ni ja evoluis, ĉar en niaj landoj ni evidente ne povas ĉesi kreski ! Dikeco jam fariĝas grava problemo en multaj landoj kaj la statistiko montras, ke tiu problemo pli kaj pli graviĝas. Nu, kial estas dikeco grava ? Ĉu dika homo ne aspektas sana kun ruĝaj vangoj kaj kora rido ?

Jen okazo kie aspektoj trompas. Estas bone konate de kuracistoj, asekuristoj kaj aliaj fakuloj, ke dikaj homoj ne vivas tiel longe kiel maldikaj. Precipe serioza estas la danĝero de kora kolapso, arteriosklerozo kaj diversaj aliaj similaj malsanoj. En Britujo kaj Usono proksimume 40 % de mortoj okazas pro ia formo de kora aŭ arteria malsano. En Britujo unu viro el ĉiuj kvin suferas de atako de koronaria koro-morbo antaŭ la aĝo de 65. Feliĉe por la virinoj ili ne estas tiel vundeblaj.

Bonŝance, multaj ne mortas sed suferas de tiu koronaria atako ne mortiga. La kuracado ĉiam estas la sama — rigora dieto por maldikiĝi kaj ekzercado. La unua konkludo por sanaj homoj estas — se vi deziras ne suferi de kora kolapso kaj vi jam estas tro dika, maldikiĝu nun !

Kvankam mi parolas precipe pri sano, kompreneble ekzistas aliaj kaŭzoj regajni svaltan figuron. Sinjorinoj, ni scias, estas instigitaj maldikiĝi pro la beleca faktoro pli ol la sana. Ne gravas, vi gajnos duoble ! Kaj oni ĉiam povas trovi konvenajn vestaĵojn en magazeno kiam oni estas maldika.

Ĉu vi portas tro da graso ? Ekzistas multaj tabeloj de ĝustaj pezoj laŭ alto. Ili estas tre utilaj kaj pesilo en la banĉambro estas necesaĵo de la moderna hejmo. Sed la plej utila ilo estas spegulo. Senvestu vin kaj rigardu vin antaŭ la spegulo. De kie venis tiu volvaĵo de graso ĉirkaŭ la talio ? Ĉu fakte talio ekzistas ? Se vi povas pinĉi la karnon super la talio kaj tiel preni tavolon de karno, 3 cm dika, vi estas tro korpulenta. Alia signo — nur por viroj — estas, ke la talio devus mezuri ĉirkaŭe malpli ol la brusto.

KIEL DIETI ?

Se vi jam konstatis, ke vi estas tro dika, ĉu vi posedas la forton agi adekvate ? Mi avertu, se vi ankoraŭ ne provis, ke la vojo ne estas glata kaj oni devas dediĉi sin al la lukto. Eble vi jam aŭdis pri kalkulo de kalorioj, evito de sukero, ktp, sed mi konsilas du simplajn principojn jenajn :

1) Manĝu, laŭeble, la ĝustajn nutraĵojn (vidu sube).

2) Manĝu tiom, ke vi estas malsata antaŭ la venonta manĝo.

Eble, ĉi tie estas taŭga punkto mencii, ke mi mem estas persono, kiu facile dikiĝas. Mi jam reduktis la pezon kaj senĉese luktas por reteni ĝin malalta ; do, mi trovis laŭ-sperte, ke tiuj reguloj efikas.

SIGNIFOJ

Mi ne deziras eniri longan referaton pri teknikaĵoj, tamen estas utile al ĉiuj scii iom pri la diversaj terminoj. La ĉefaj konsistaĵoj de nutraĵo estas :

proteinoj : nitrogen-havaj substancoj, kiuj estas nepraĵoj de la korpo pro tio, ke ili reformas difektitan histon.

karbonhidratoj : kombinaĵoj kiel sukero, amelo, ktp.

graso : substanco kiu troviĝas en la homaj kaj bestaj histoj.

Se oni manĝas pli da proteinoj ol bezonataj por la sano la eksceso ŝanĝiĝas en karbonhidratojn, kiuj estas uzataj de la korpo por energio. La eksceso de karbonhidratoj ŝanĝiĝas en grason, kiu ankaŭ povas doni energion sed kutime restas ! La reciproka ŝanĝiĝo ne povas okazi ; do, oni devas manĝi sufiĉe da proteinoj por la sano. Manĝaĵoj, riĉaj je proteinoj, kutime bone kontentigas la apetiton. Kontraŭe, multaj homoj emas manĝi tro da manĝaĵoj, riĉaj je karbonhidratoj kaj graso : tiel la homo dikiĝas !

Troviĝas aliaj esencaj elementoj, vitaminoj kaj mineraloj. Se oni manĝas prudente, oni kutime manĝas sufiĉe da ambaŭ. La sola problemo povas koncerni vitaminon C. Oni povas plenigi la mankon de tio per piloloj.

Alia elemento en nia dieto ne estas dezira — kolesterolo — kiu troviĝas en animalaj grasoj. Jam sendispute evidentiĝis, ke tiu substanco malutilas ĉar ĝi povas obstrukci la arteriojn. Prefere oni retenu malaltan kolesterolo-nivelon en la sango, kaj por tion fari, ni ne manĝu tro da animala graso. Rimarku ankaŭ, ke kolesterolo troviĝas en lakto, butero, fromaĝo kaj ovoflavo, interalie.

Mi jam menciis kalorioj n. Kalorio, fakte, estas unuo de varmokvanto, kaj tiel mezuras kaj la valoron de la nutraĵo kiun ni konsumas kaj la energion kiun ni disigas. Se ni deziras ne dikiĝi estas necese, ke la enpreno de kalorioj devas egali la eluzon pere de korpa moviĝo, varmiĝo, ktp. Se ni deziras maldikiĝi la enpreno devas esti malpli ol la eluzo.

KIA DIETO ?

Estas bedaŭrinde, ke kiam oni deziras maldikiĝi, aŭ helpi la sanon per dieto, oni ofte aŭdas la deadmonon, « **Ne** manĝu tion ». Prefere ni estu pozitivaj, kaj mi provos diri, « Manĝu tion ». Sed unue mi devas diri unu neon, kaj temas pri kuirado.

La metodo de kuirado povas multe diferencigi inter utila kaj noca manĝaĵo. Kaj la simpla devizo estas, « Ne fritu ion ajn ! » Vi rajtas boli, stufi, rosti, baki, sed ne friti, precipe per grasaĵo. Matene, anstataŭ friti lardon, kial ne kradrosti ĝin ? La gusto samas kaj la kaloria valoro estas frakcio de la fritaĵo. Moderna faka opinio ankaŭ sugestas, ke ni anstataŭigu porkgrason per vegetala oleo en kuirado.

Sube mi donas tabelon de diversaj manĝaĵoj, kiujn mi aranĝas laŭorde de « bono ». Tiu estas sumigo de konsiloj de pluraj fontoj. La eroj ĉe la supro de la listo estas

la plej bonaj laŭ nutrovaloro, malgrando de kalorioj kaj manko de kolesterolo. Evitu, laŭeble, la erojn ĉe la subo de la listo.

Ankaŭ mi substreku la neceson ekvilibrigi la dieton. Vi vidas, ke frukto estas ĉe la supro de la tabelo. « Do bone », vi diras, « mi manĝos nenion krom frukto ». Fakte, vi erarus se vi pensus tiel. Estas prefere manĝi iom de la diversaj eroj ĉe la supro por gajni esencajn vitaminojn, mineralojn, ktp. Povas esti eĉ malsanige manĝi tro da unu manĝaĵo. Tamen, jen estas la tabelo kun notoj.

Frukto : freŝa — ĝenerale saniga sen malutilaĵoj — precipe citrusaj fruktoj kiel oranĝoj kaj grapfruktoj — ankaŭ pomoj, tomatoj, piroj, vinberoj, persikoj, ananasoj, fragoj, framboj, ktp — krom bananoj frukto ĝenerale ne estas tro riĉa je kalorioj.

Vegetaĵoj : sambone kiel frukto — precipe laktuko, brasiko, florbrasiko, brasiketoj bruselaj, karotoj, pizoj — ne manĝu tro da terpomoj.

Fiŝo : preskaŭ ĉia speco — riĉa je proteinoj sen tro da kalorioj aŭ graso.

Kokinaĵo : ankaŭ maleagraĵo, fazanaĵo kaj similaj kortbirdoj — same kiel fiŝo.

Hepataĵo : ankaŭ renaĵo — tre riĉa je proteinoj kaj vitaminoj.

Bovaĵo : ankaŭ ŝafaĵo — riĉa je proteinoj sed kun sufiĉe da kalorioj — fortrancu grason.

Ovoj : riĉaj je proteinoj, vitaminoj kaj mineraloj sed kun kolesterolo — pro tio, prefere limigu ĝis 7 ĉiusemajne (inkluzive la enhavon de kukoj, ktp).

Supo : dependas de la enhavo — precipe bone kun vegetaĵoj, kokinaĵo, ktp.

Lakto : ofte nomita « perfekta nutraĵo » pro proteinoj, vitaminoj kaj mineraloj — tamen ĝi ankaŭ enhavas multe da kalorioj kaj sufiĉe da kolesterolo — adoltoj limigu ĝis 1/4 litro ĉiutage, aŭ ĝis 1/2 litro de senkremigita lakto.

Porkaĵo : ankaŭ lardo — simila al bovaĵo sed kun pli da graso, do ne tiel bona.

Teo : ankaŭ kafo — sen lakto kaj sukero ili enhavas neniujn kaloriojn, sed trinku modere.

(Fino, paĝo 11)

MI ESTA TIE

James Dillet FREEMAN

Tiu poemo, skribita sur ŝtofo, estis lasita sur la surfaco de la Luno, de astronaŭto James Irwin.

Ĉu vi deziras Min ?
Mi estas tie.
Vi ne povas vidi Min, tamen estas la lumo per [kiu vi vidas.
Vi ne povas aŭdi Min tamen Mi parolas per via [voĉo.
Vi ne povas palpi Min, tamen Mi estas la potenco [laboranta per viaj manoj.
Mi laboras, kvankam vi ne povas kompreni [miajn celojn.
Mi laboras, kvankam vi ne rekonas miajn [verkojn.
Mi ne estas strangaj vizioj. Mi ne estas misteroj.
Nur en absoluta kvieteco, trans la mio, vi povas [koni Min,
Tian, kia Mi estas. Kaj tiam, nur kiel sento kaj [fido.
Tamen Mi estas tie. Tamen mi aŭdas. Tamen Mi [respondas.

Kiam vi deziras Min, Mi estas tie.
Eĉ kiam vi negas Min, mi estas tie.
Eĉ kiam vi kredas esti sola, Mi estas tie.
Eĉ kiam vi timas, Mi estas tie.
Eĉ kiam vi suferas, Mi estas tie.
Mi estas tie, kiam vi preĝas, kaj kiam vi ne [preĝas.

Mi estas en vi, kaj vi estas en Mi.
Nur per via menso vi povas kerdi vin dis de mi.
Ĉar nur en via menso estas la nebuloj de « la [via » kaj « la mia ».
Tamen nur per via menso, vi povas koni Min kaj [sperti Min.

Malplenigu vian koron, kaj forigu timojn.

Kiam vi erarvagas, Mi estas tie.
Vi mem povas fari nenion, sed Mi povas fari ĉiom.
Kaj Mi estas en la ĉiomo.

Kvankam vi povas nevidi la bonon, la bono estas [tie, ĉar Mi estas tie.
Mi estas tie, ĉar Mi devas esti, ĉar Mi estas.

Nur pro Mi la mondo havas signifon.
Nur per Mi la mondo havas formon.
Ĉar nur per Mi la mondo progresas.

Mi estas la leĝo, el kiu fontas la moviĝo de l'steloj.
Kaj la kresko de l'vivantaj ĉeloj.

Mi estas la amo, kiu estas plenumiĝo de la leĝo.

Mi estas paco.
Mi estas unueco.
Mi estas la leĝo, per kiu vi povas vivi.
Mi estas la amo, kiun vi povas atingi.
Mi estas via certeco.
Mi estas via Paco.

Mi estas unu kun vi.
MI ESTAS.

Kvankam vi maltrafas trovi Min, Mi ne delasas [vin.
Kvankam via fido al Mi estas necerta,
Mia fido al vi neniam ŝanceliĝas.
Tial ke Mi konas vin.
Tial ke Mi amas vin ;
Amatoj,
Mi estas tie.

tradukis Eloi Motillon.
El Usona lingvo,

PIERRE DANINOS

EL "LA NOTLIBROJ DE MAJORO W. MARMADUKE THOMPSON - MALKOVRO DE FRANCUJO KAJ DE LA FRANCOJ" el la franca : R. Imbert

MAY I INTRODUCE MYSELF ? (1)

Bonkonduta Anglo — se mi kuraĝas riski tiun pleonasmon ne ŝokante miajn honorindajn samnacianojn — ne povus, krom perdante sian tutan moralecon, paroli pri si mem, ĉefe ĉe la komenco de rakonto. Sed, samkiel astronaŭtoj, kiuj ekde ia distanco ne plu estas trafataj de la leĝoj de gravito — mi ne plu sentas min submetita — tuj kiam mi estas ĵetita sur la kontinenton — je la leĝoj de brita prempezo. Kaj, ĉar mi devas pri ili mem paroli al homoj al kiuj mi neniam estis prezentata, mi troviĝas pli libera por fari tion, kion oni ne rajtas fari, kaj doni pri mi detalojn, kiuj aliflanke de la Kanalo, aspektus mislokitaj.

Mia nomo estas Thompson.

William Marmaduke Thompson.

Ĉar mi havis la bonŝancon naskiĝi Anglo, mi trapaŝas la vivon en sandviĉo, antaŭigata de miaj komencliteroj kaj sekvata de tiu kuseneto kie la reĝaj honoroj kune kun la jaroj deponis siajn aluviojn : D.S.O. (2), C.S.I. (3), O.B.E. (4). Oni ne suspektus kiom tiuj literetoj, la antaŭaj same kiel la postaj estas karaj al Anglo : netrabateblaj limoj de lia personeco, ili ŝirmas lin kiel honora waterproof, ili protektas lin samkiel mola remburkuseno, de tro rektaj homaj kontaktoj. Kiam Franco skribas al mi leteron kaj adresas ĝin al « Monsieur Thompson », mi havas la impreson ke mi malvarmumas ĉe la patronomo, kaj ke mi estas publike senvestigita, kio estas malplaĉa : ĉar, fakte, la sendinto malkorekte kondutis, kaj mi estas tiu, kiu sentas sin ŝoka.

Mi ne volus, ke la Francoj incitiĝu de tiu rimarko. Mi kuraĝas paroli pri ili malferme, tial ke mi ilin amas tiom, kiom ili amas la anglan reĝinon : kiel oni amu pli bone ? De la tago kiam mi forlasis la armeon kaj post kiam Ursula forpasis (5), kaj mi establis mian ĉefan loĝejon en Parizo, patrujo de mia dua edzino, mi estimas min duoble privilegiita : mi estas Anglo france nutata.

Piednotoj : apartenantaj al la franca eldono.

(1) Jam de la unua linio, diskuto oponis la Majoron kun lia franca kunlaboranto. Tiu-ĉi volis traduki la titolon per « Ĉu mi povas prezenti min ? », sed la Majoro insistis por ricevi pli laŭvortan tradukon. « Enkonduki min » ŝajnas al mi pli ĝusta. — Tion oni france ne dirus, diris la Franco. — Tiam, lasu ĝin en la angla, diris la Majoro. Ĝi pli bone signifas, kion ĝi devas signifi ». La tradukinto, ne volante kompromiti jam de la tutkomenco, la plenan entreprenon, ne insistis, sed li rimarkigas ke ĉiuj aliaj titoloj, same kiel la plej granda parto de la traduko estas france redaktitaj.

(2) Distinguished Service Order, alta militordeno.

(3) The Most Exalted Order of the Star of India /compagnon/.

(4) The Most Excellent Order of the British Empire /oficiro/.

(5) Plej eble laŭvorta traduko de « passed away », esprimo kiun la Angloj preferas al « morti », ĉefe kiam temas pri kara estaĵo. Ursula estis la unua edzino de la Majoro.

⁂

FRANCO, KIO ESTAS TIO ?

En la sekreteco de sia kabineto en Harley Steet (1), unu el miaj amikoj, fama cerbo-kirurgo, iam malfermis la kranion de Anglo.

Li tie ekvidis unue kirasŝipon de Ŝia Majesto, poste pluvmantelon, reĝinan kronon, tason de teo, dominionon, policanon, la regularon de Royal and Ancient Golf Club of St Andrews (2), unu cold-stream guard (3), botelon de visikio, Biblion, la horaron de eksprestrajno Calais-Méditerranée, flegistinon de Westminster Hospital, kriket-pilkon, nebulon, terpecon sur kiu la suno neniam malleviĝas, kaj tute en la fundo de lia subkonscio tegita de plurjarcenta razeno, naŭvostan katon (4) kaj lernantinon kun nigraj ŝtrumpoj.

Malpli terurita ol konscia pri sia bedaŭrinda maldiskretaĵo, li helpvokis nek Scotland Yard nek la Brigadon kontraŭ Malmoraleco : li refermis kaj li estis devigita rekoni, ke ĉio ĉi konsistigis reale bonan Anglon.

Mi ofte demandis min, kion mia amiko trovus, se li malfermus Francon (5).

By Jove ! (6) Kiel difini Francon ?

La tradicia difino de Franco, kiu manĝas panon, ne konas geografion, kaj portas la ordenon de la « Honora Legio » ne estas tute malĝusta/ kvankam la Honora Legio, vidata de pli proksime kelkfoje estas nur la maroka ordeno Ouissam Alaouite.

Sed tiu difino ne estas sufiĉa.

Mi timas pensi (7), ke se mia amiko malfermus Francon, li falus, kaptita de vertiĝo, antaŭ abismo da kontraŭecoj.

Vere... Kiel difini tiujn homojn, kiujn dum la tuta dimanĉo proklamas sin respublikanoj kaj dum la tute semajno adoradas la Reĝinon de Anglujo, kiuj diras sin modestaj, sed ĉiam rakontas ke ili portas la Torĉon de Civilizo, kiuj el prudento konsistigas unu el siaj ĉefaj eksport-artikloj, sed hejme konservas tiel malmute ke ili faligas siajn registarojn preskaŭ tuj post ilia starigo, kiuj lokas Francujon en sia koro, sed siajn riĉaĵojn en eksterlando, kiuj estas malamikoj de Judoj ĝenerale, sed intima amiko de unu difinita Izraelano, kiuj ŝategas ke iliaj kanzonistoj ridindigu la « glaciiĝintajn armeostrojn », sed al kiuj la plej eta klariona signalo donas militistan kruron, kiuj abomenas ke oni kritiku iliajn malperfektaĵojn, sed mem senĉese nigre pentras ilin, kiuj pretendas sin enamiĝintaj je la bellinioj, sed nutras aminklinon plej teneran al Efel-Turo, kiuj admiras ĉe Angloj la ignoron de la « eltiriĝa sistemo », sed opinius sin ridindaj se ili deklarus al la impostestro la ĝustan sumon de sia mona perlaboro, kiuj malferme ridas pri skotaj rakontoj, sed volonte provas ricevi ion por prezo suba je tiu sur la etikedo, kiuj referas kun memkontento al sia Historio, sed novajn historiaĵojn (8) precipe ne volas, kiuj malŝategas transiri iun landlimon sen kontrabanda kunporto de iu aĵeto, sed sentadas naŭzon kiam ili ne estas flanke de la leĝo, kiuj antaŭ ĉio asertas sin nesuperruzeblaj, sed tuj elektas deputiton kondiĉe ke li promesis la lunon, kiuj diras « Dum Aprilo, ne senvestiĝu eĉ je fadeno », sed haltigas ĉian hejtadon la 31-an de marto, kiuj laŭde prikantas la gracion de sia kamparo, sed al ĝi faras la plej grandajn ofendojn, kiuj havas notindan respekton al Tribunaloj, sed turnas sin al advokatoj nur por pli bone scii kiel trompe ĉirkaŭiri la leĝon, fine kiuj restas trasorĉitaj kiam unu el iliaj granduloj parolas pri ilia *grandeco*, pri ilia *granda* civiliziga misio, pri ilia *granda* lando, pri iliaj *grandaj* tradicioj, sed kies revo estas retiriĝi, post *trankvila* *viveto* en *etan kvietan* lokon, sur sia propra terpeceto, kun iu virineto kiu kontentiĝos per malmultkostaj robetoj, prizorgos la kuiradon de delikataj manĝaĵetoj, kaj scios eventuale afable akcepti la geamikojn por *eta* belota kartludo ?

***

Piednotoj :

---

(1) *Harley Street :* Londona strato kie troviĝas ĉefe kuracistaj konsultejoj.

(2) *Royal and Ancient Golf Club of St Andrews :* Reĝa kaj Malnova Golf-klubo de Sankt-Andreo.

(3) *cold-stream guard :* laŭvorte « malvarmflua gardisto ». Mankas klarigo en la originalo. Ŝajnas, ke oni devas ĝin interpreti kiel « malvarmsanga gardisto » /eble lim-gardisto, doganisto/

(4) *naŭvosta kato :* alegoria esprimo por naŭrimena vipo, kun feraj pintoj ĉe ĉiu fino, per kiu oni batas maristojn, soldatojn, ktp.

(5) ... *se li malfermus Francon :* Sud-Afrikano, eksciinte el sia gazeto la demandon kiun starigis al si la Majoro, skribis al « Natal Daily News » en Durban, kiu la 20-an de januaro 1954 publikigis la strangan jenan rakont-respondon :

« Mi konas la priparolatan kirurgon kaj povas konfirmi la dirajojn de la Majoro : mi estis la flegistino kaj mi vidis la eltiradon de la diversaj objektoj... Sed tio, kion la Majoro ne diras, estas ke la kirurgo estis Franco ; kaj kion li ne scias, mi enamiĝis je li. Nu, unu tagon, li devis mem esti operaciata je la cerbo. Ĉe la ĝenerala mirego, kiam lia kranio estis malfermita oni trovis dek-naŭ eks-prezidantojn de la Ministra Konsilantaro, tri dancistinojn el la varietejo Folies-Bergères, duonan skatolon da longe putrinta Camembert-fromaĝo, tute finitan Maginot-an strategian linion, ne parolante pri pluraj kamionoj da senvaloriĝintaj frankoj ».

(6) *By Jove :* Je la Zeŭsa nomo.

(7) *Mi timas pensi :* La Majoro skribas « I am alarmed by the thought » Ŝatata angla parol-turno samkiel « I am afraid... » : Mi timas /timegas/ ke... Anglo, ekzemple, *kiam li tre bone scias li forgesis ion,* diras ke li « tre timas kredi ke li forgesis ĝin ».

(8) *novaj historiaĵoj :* komprenu : implikaĵoj, malfacilaĵoj en la « privata historio ».

MALLONGA VOJAĜO AL BRAZILO

de Bernard Golden

Stanislaw Kowalski ĉiam revis pri vojaĝoj eksterlanden. Li ne estis brila lernanto en la mezlernejo — fakte, oni opiniis lin maldiligenta — sed li ĉiam ricevis eminentaj notojn en unu lernobjekto : la geografio. Li ne nur parkerigis la enhavon de siaj geografiaj lernolibroj, sed ankaŭ avide tralegis ĉiujn vojaĝmagazinojn kaj librojn, kiuj trafis en liajn manojn. Filmoj kaj televidprogramoj pri fremdaj landoj sorĉis la 17-jaran junulon. Li ne kapablis enkapigi la bazajn faktojn pri la historio aŭ solvi la plej simplajn matematikajn problemojn, sed li sciis, kie troviĝas ĉiuj foraj landoj en la mondo kaj povis rakonti plendetale pri iliaj urboj, natura ĉirkaŭmedio, popoloj kaj industrioj.

Pasintan semajnon la mondo preskaŭ falis ĉirkaŭ Stanislaw, ĉar li estis informita, ke oni ne akceptos lin en la marista altlernejo. La junulo ankoraŭ ne komencis pensi pri alia laboro, sed nur sencele pasigis la tagojn ĉe la marbordo apud la haveno de Gdynia, kie li povis rigardi la venadon kaj iradon de ŝipoj en la Gdanska Golfo. Li bone konis la buntajn flagojn, ne nur de la diversaj nacioj sed ankaŭ de la ŝipkompanioj, kaj leginte la nomon de la registro-urbo sur la ŝipŝelo, li facile povis diveni, kiujn varojn la kargoŝipo liveras kaj per kiuj produktaĵoj oni ŝarĝos ĝin por la vojaĝo hejmlanden.

Iun brilan sunplenan tagon, frumatene vagante apud la dokoj li ekvidis ŝipon el kiuj la ŝipanoj elŝarĝis grandajn pezajn sakojn. Ekrigardante la flagon li eksciis, ke la ŝipo estas brazila, do li konkludis, ke la sakoj certe enhavas kafon. Brazilo — kafo — Onklo Tadeusz. Per asociado de ideoj li memoris pri la plej aĝa frato de sia patrino, kiu antaŭ 40 jaroj elmigris al Sudameriko kaj per ŝvitiga laboro kaj ruza negocado sukcesis fariĝi la posedanto de granda kafoplantejo. Onklo Tadeusz ofte skribis al la familianoj en Pollando kaj sendis multajn fotografaĵojn. Stanislaw ĉiam deziris sekvi la paŝojn de Onklo Tadeusz, kiun li ege estimis, kvankam li neniam havis la okazon koni lin persone. Kaj Onklo Tadeusz, informita pri la interesiĝo de la knabo rilate malproksimajn landojn kaj popolojn, skribis apartajn leterojn al li kaj sendis belajn bildkartojn el la tuta Sudameriko.

Stanislaw ĵetis rigardon al la pobo de la ŝipo. Sur rustiĝanta fono estis legeblaj la blankaj literoj de la nomoj « Rio Branco — Santos ». « Ho ! » li ekscitite diris al si, « tiu ŝipo venas el la ĉefhaveno de la ŝtato Sao Paulo, kie loĝas Onklo Tadeusz. Eble la kafo, kiun ĝi portis venis ĝuste de la plantejo de Onklo Tadeusz. Kiel bone estus labori kiel maristo kaj havi la eblon reiri kun tiu ŝipo kaj renkontiĝi kun Onklo Tadeusz. » Sed rigardante la brunajn kaj nigrajn vizaĝojn de la viroj, kiuj elŝarĝis la 60-kilogramojn pezajn kafosakojn, Stanislaw malgaje konstatis, ke sur tiu ŝipo la ŝipanaro estas brazila, ne pola. Enpensiĝante, la junulo komencis formi aŭdacan planon : se li nur povus dungiĝi kiel havenlaboristo, eble li trovus okazon kaŝe enŝipiĝi...

Interrompis lian revadon la zumado de aŭtomobilo, kiu kun ŝrika bremsado abrupte haltis antaŭ la pordego de la kajo. La literoj CD sur la numerplato de la luksa Mercedes-Benz indikis al Stanislaw, ke ĝi estas veturilo de diplomato, kaj li konjektis ke oni veturigis ĝin tien ĉi nun por perŝipi ĝin reen al Brazilo. Elaŭtiĝinte, la ŝoforo rapide alpaŝis al la pordeg-gardisto kaj enmanigis al li kelkain paperoin. Traleginte kaj stampinte ilin, la gardisto iris kun la ŝoforo paroli kun la ŝipestro.

Fulmorapide la plano skizita en la kapo de la junulo prenis konkretan formon. Li tuj kuris al la aŭto, momente ŝirmata de la rigardo de la gardisto kaj la ŝoforo per monteto da kafosakoj. Malferminte la ankoraŭ ne ŝlositan pordon, Stanislaw saltis en la postan parton de la aŭto kaj kaŝis sin sur la planko, tirante sur sin amason da gazetoj kaj magazinoj, kiujn li trovis sur la sidloko. Baldaŭ la veturilo estis lokita sub kargobumo, kiu levis kaj demetis ĝin en la holdon. Ĝi estis la lasta ŝarĝaĵo, kaj la stivistoj fermis la ferdekan klapon, lasante Stanislaw en mallumo.

Post duonhoro li sentis la vibradon de la ŝipmotoro. « Ek al Brazilo ! » li laŭtvoĉe kriis, gratulante sin pro la sukcesplena ekirigo de sia vojaĝo. Li malfermis fenestreton de la aŭto kaj senĝene komencis fumi cigaredojn, unu post alia ĝisstumpe, tute ne konscia pri la ruĝlitera tabulo sur la vando antaŭ strikte malpermesanta la fumadon. Per la flagranta lumo de la alumetoj li konstatis, ke la ŝoforo forgesis forpreni la ŝlosilojn de la instrumentpanelo. Li eklumigis la internajn lampetojn, ŝaltis la radion kaj komencis trarigardi la magazinojn. Kelkaj kun fotoj de nudulinoj absorbis lin dum iom da tempo, ĝis lia stomako atentigis lin pri alia apetito. Sed baldaŭ la milda balanciĝo de la ŝipo lule endormigis la junulon.

Stanislaw estis subite vekita per forta skuado, kaj malfermante siajn okulojn, li vidis, ke la aŭto jam forlasas la holdon kaj, tenata de la levbumo, ŝvebas alte en la aero. « Kio okazas ? », li ekscitiĝinte ekkriis, nun tute vekiĝinta. « Kial oni elŝarĝas la aŭton nun ? En kiu haveno ni estas ? » Li rigardis sian horloĝon. Nur kelkaj horoj forpasis post lia enŝipiĝo. Sed li ne havis tempon pludemandi sin. Tuj kiam la veturilo atingis la nivelon de la ferdeko kaj estis banata en la blinduma posttagmeza sunlumo, li plonĝis sub la dissternitajn gazetfoliojn. Sur la kajo kelkaj dokistoj malligis la hokŝnurojn kaj puŝis la aŭton al la ŝarĝdeponeja zono. Stanislaw, timante resti en la aŭto, kiu verŝajne jam finis sian vojaĝon, nevidite elŝteliĝis kaj kaŝis sin malantaŭ vico da benzintamburoj. Tiam li vidis, ke la samaj dokistoj revenis kaj grumblante ŝovis la aŭton al la ŝipo. « Sterkaj stultuloj ! » sakris Stanislaw. « Ili erare elŝarĝis. Ĝi ja devas iri al Brazilo. » La junulo nun tute konsterniĝis, ĉar jam ne estis ebleco reatingi lian kaŝlokon en la veturilo, kaj li ne vidis alian manieron denove iri surŝipen.

« Sed kie je la diablo mi estas ? » li demandis, ĉirkaŭrigardante. Li vidis grandan havenon similan al multaj aliaj en la mondo. Vico da ŝipoj kuŝis ĉe la kajo, kaj apud ili svarmis dokistoj kaj ŝarĝistoj. Aliaj laboristoj promenis, ripozis aŭ manĝis. Naztiklaj aromoj venantaj el manĝaĵ-kiosko, kie oni fritis kolbasojn, allogis lin en tiu direkto. Apud la kiosko aro da laboristoj staris ĉe alta tablo manĝante kolbasojn kun pano kaj trinkante bieron. Ili parolis germane. « Do estas germana haveno, sed kiu ? » Stanislaw strečis sian memoron pri la geografio de la Balta Maro. Unu el la laboristoj legis gazeton, kaj Stanislaw haŝrigardis super lia ŝultro : « *Ostseezeitung* — Rostock. Do mi estas en Rostock. Tiu urbo ja ne estis en mia vojaĝplano. Kion fari nun ? »

Orelsurdiga kriĉo de ŝipa fajfilo sonis, kaj la ĉefo de la skipo urĝis ĉiujn finmanĝi kaj iri al la apuda ŝipo, kiu ĵus signalis. La junulo ankoraŭ staris antaŭ la kiosko, kiam la dokistoj foriris, kaj vidante, ke ili forlasis mangaĵojn, li kolektis la restantajn panpecojn kaj kolbasojn kune kun tri aŭ kvar ankoraŭ ne malplenaj boteloj da biero kaj voreme satigis sin. Kun plena stomako li reakiris sian aplombon kaj komencis pensi pri la daŭrigo de sia vojaĝo, kvankam la efiko de la biero iom ĝenis lian cerbumadon.

La plej vigla agado estis ĉe *L'Aurore,* franca ŝipo, kies heimhaveno estas Le Havre. Oni komencis ŝarĝi la ŝipon, kaj Stanislaw estis altirita al ĝi kvazaŭ najlo al magneto. Surkaje staris granda remork-kamiono, kaj el ĝi ŝarĝistoj portis surŝultre kestojn kaj skatolojn sur pasponteton, kiu eniris la holdon tra pordo ĉe la malsupro de la ŝipŝelo. La junulo rigardis atente la rutinan iradon de la ŝarĝistoj kaj tuj elpensis novan planon. Rezignante provizore la vojaĝon al Brazilo, li decidis fari

etapon en Francujo. Ankaŭ tie en Normandio estis parencoj por viziti.

Li alproksimiĝis al la kamiono kune kun kelkaj aliaj dokistoj. Laboristo en la malantaŭo de la remorko disdonis la skatolojn, kaj Stanislaw, enviciĝante kun la aliaj, ricevis la sian. Surŝultrigante la pezan ŝarĝon, li ŝanceliĝante portis ĝin en la holdon. Tie stivisto fingromontris, kie oni devas stakigi ilin, kaj la junulo sekvis la aliajn. Liberiginte sin de la skatolo, li rapide ĉirkaŭ-rigardis kaj trovis malplenan spacon inter la stivtrabaro. Tie li restis ĝis la fino de la ŝarĝado. Kiam la dokistoj kaj stivistoj foriris, li komencis esplori la ŝipon kaj post kelkminuta serĉado en la labirinto de pasejoj kaj koridoroj, li hazarde trovis la manĝaĵprovizejon. Kuŝiĝante sur kelkaj sakoj da faruno en malluma angulo, li atendis la ekiron de la ŝipo. La kuiristo plurfoje envenis por akiri manĝaĵojn, sed ne konstatis, ke kaŝvojaĝanto estas lia gasto.

Dum trenŝipo tiris la kargoŝipon tra la havena ŝanelo, Stanislaw ridklukis laŭte. « Maren ! Nun vere komenciĝas la granda aventuro. » Li sentis sin tre bonŝanca, ĉar li sukcesis dufoje enŝipiĝi kaj ekvojaĝi sen mono, sen biletoj, sen vizo kaj sen pasporto. « Kia vivo ! » Kun eĉ pli granda apetito ol antaŭe, la junulo regalis sin per luksa vespermanĝo akompanita de botelo da ruĝa vino. Kiam ceŝis la gluglado de la malpleniĝinta botelo, aŭdiĝis la ronkado de la ridetanta memfida junulo, kiu komencis sonĝi pri novaj aventuroj en Francujo.

Vespere en la komandejo, la ŝipestro enmanigis dosieron al la ĉefmaato kaj ordonis, « Jen la rostokaj dokumentoj. Nun pretigu la polajn manifestojn. Ni endokiĝos en Gdynia morgaŭ frumatene.

JE VIA SANO !

(Sekvo de la paĝo 7)

Fromaĝo : tre riĉa je proteino sed kun multe da kalorioj kaj sufiĉe da kolesterolo — prefere limigu ĝis 250 gm ĉiusemajne.

Pano : la plej malmultekosta fonto de proteinoj — tamen la enhavo de karbonhidratoj signifas, ke oni manĝu ne tro da ĝi — prefere manĝu panon faritan el nerafinita faruno (angle — whole meal bread) — ankaŭ substituaĵoj estas bonaj ĉar ili kutime enhavas malpli da kalorioj.

Makaronio : ankaŭ spagetoj — simila al pano.

Margarino mola : iuj molaj margarinoj estas speciale faritaj kun preskaŭ neniu kolesterolo — prefere uzu anstataŭ butero.

Butero : simile riĉa kiel fromaĝo — por eviti kolesterolon manĝu molan margarinon.

Ĵeleo : sufiĉe bona por deserto.

Marmelado : ankaŭ ĉia konfitaĵo — multe da kalorioj !

Alkoholaĵoj : viskio, brando, ktp povas helpi la sanon se oni trinkas tre modere, sed multaj kalorioj.

Biero : preskaŭ neutila — multaj kalorioj.

Pastaĵo : nevalora — multe da kalorioj.

Sukeraĵoj : glaciaĵo, kukoj, biskvitoj, ktp — bongustaj sed nevaloraj — abundaj kalorioj.

Ĉokolado kaj bombonoj : neutilaĵoj — difektas la dentojn — giganta kvanto da kalorioj.

En ĉi tiu artikolo mi provis skizi la precipajn punktojn pri « ĝusta » nutrado. Se iuj el niaj legantoj deziras skribi pri spertoj aŭ fari demandojn, plaĉas al mi aŭdi ; espereble mi povos respondi en venonta artikolo.

FALSA SOLEGO

Aleksandro WEORES

Kie naskis nokte bluaj serpentoj
okaze trompiĝ', sombra fon',
detruas friskan sonĝon sentoj
de maldormulino en najbara dom'.
Neniam vidas ni unu la alian,
kiel du fremdul' en tombej kuŝas nur ĉiam,
kvankam de mi kaŝas sin minca ŝton'.

Sed bluaj serpentoj boriĝas tra la mur',
ĉirkaŭ mi malrapide naĝas,
disŝutas triston sur la garnitur',
nek min rigardas, senvoĉe adiaŭas,
kaj impetas tra kaŝitaj imagoj
de aliuloj, kiel rapidaj sagoj,
kiuj ankoraŭ viglas aŭ jam dormas.

La alveninta brilet' malafabla
evoluto tremetas en mia kor'.
Duonsvene, en sorĉo febla
mi leviĝas el mian korpon for
kaj nubas en la maltrankvila spac'
de la najbarino sur ŝia matrac'
en tempest-pulsadoj de ŝia dolor'.

Ŝia mano sur ŝaltil' fingrumadas,
ŝiaj fingroj dehiskas nun kiel lumtend',
ektimiĝe, palpebrume rigardas
sed kaŝas min mia senkorpa silent',
kaj la aro ĝermita el ŝia larmo
rapide vibras tra mia spaca formo,
falas en pli vastan spac' sub la firmament'.

Ŝia harar' hejmece distaŭzita ;
ne ridetas — ripozas la buŝo muta,
ŝia kovrilo forpiedbatita,
ŝia malhela pelvo estas nuda.
Pala belulin' vertiĝas en sia amar'
sen ŝia mema ĉarmeca armilar'
brulcindriĝe ruinŝuta.

Mi falas en ŝin, kovras min virina karn',
mi kuŝas en bruon de ŝia febra fatal',
mi aŭdas ĉiam pli forte frapi la svarm'
de la tamtamoj en ŝia ĝangal',
en humida varmo, sub viva teksaĵo
renkontas viva kaj morta vizaĝo
kaj por kaŝint' komencas kruela batal'.

Mi vekas ŝercaĵojn en ŝi per inspir'
kaj inter larmoj ridas jam tra ŝia amer',
la fajrera ondo de ŝia dezir'
lulas fremdan bebon, kiel la mar'.
Enlacige ŝi vokas la sonĝon.
malheliĝis sur nin ŝiaj okulhar'.

(Tradukis : L. TIHANYI)

POR VIA DISTRO

POR VIA DISTRO

Solvo de la antaŭa problemo

Krucvortoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
I	L	A	B	O	R	D	O	N	A	N	T	O
II	I	B	I	S	O	■	R	O	B	E	R	T
III	B	E	L	■	Z	U	A	V	O	■	I	A
IV	E	L	E	G	A	N	T	U	L	I	N	■
V	R	O	T	O	■	K	O	L	I	Z	I	O
VI	P	■	■	E	S	T	R	■	C	E	D	R
VII	E	N	F	L	U	O	■	P	I	R	A	T
VIII	N	E	■	E	N	■	S	K	I	A	D	O
IX	S	K	A	T	O	L	O	■	S	■	O	D
X	A	■	D	O	■	A	R	O	M	O	■	O
XI	N	I	A	■	F	E	B	R	■	D	E	K
XII	T	O	M	O	G	R	A	F	I	O	■	S

NOVA PROBLEMO

Krucvortoj

	A	B	C	D	E	F	G	H
1								
2						■		■
3								
4			■					
5					■			
6		■		■				
7	■						■	■
8								

Horizontale :

1) Muzeestro.

2) Ŝirmi per flava metalo.

3) Manuzi.

4) Prepozicio — Juvelŝtono (R).

5) Remparo kontraŭ inundo — Lirika poemo.

6) Faroj.

7) Havanta korsenton.

8) Enkorpigado (R).

Vertikale :

A) Teatraĵo (R).

B) Ĥemia elemento (R). — En ludkartoj (R).

C) Antikva alfabetlitero (R). — Ŝirmi per gluecaĵo.

D) Kamarado — Inklina sufisko (R).


E) Ŝablono — Korinklini.

F) Tetraego (R).

G) Rondigado.

H) Instrumentoj.

(R) = nur radiko.



GRAMATIKO PER BONHUMORO

ONI

Difino : (PIV) Personna nedifinita pronomo signifanta « la homoj, multaj aŭ kelkaj personoj, iu nekonata persono ».

— Oni kredis, ke kometoj anoncas malfeliĉon — oni devas ĉiam esti preta.

ONIA - ONIN : estas formoj malofte uzataj sed regulaj :

— la kulpinto metis ĉion sur onian dorson,

— ne kritiku onin, ĉar oni povas ankaŭ vin kritiki.

Ĉu singularo aŭ pluralo ? (PIV konsilas singularon)

— oni estas konvinkita (konvinkitaj), ke ili pereis.

ONI aŭ pasiva formo (en ne persona maniero)


— Oni ordonis, ke li venu hodiaŭ — estas ordonite, ke li venu.






Vintra plezuro :

Oni diris al mi, ke okazis perturboj en la tubaro de via centra hejtado ; ĉu vere ?



Ni ne fidu la onian donacon :

Trankviliĝu : Patrino kaj infano bone fartas. Tamen mi devas averti vin, ke nigraj pigmentoj intervenis.... Sendube pro la multaj ĉokoladoj alportitaj de la eksterlandaj ŝipistoj, kaj kiujn via edzino multe frandis.





Malagrablaĵo :

La onidiroj ne mensogis : ili diras lin nefidinda. Des pli malbone !

Mi devos trovi aliulon por akompani min al la hodiaŭ-vespera balo.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (160 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (240 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (4,80 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (50 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (35 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (18 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (10 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (7000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (1 800 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (10 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk 209721 (20 guld.).

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN (40 kr.).

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (10 us. dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (10 us. dol.).

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (35 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro R. Kent Jones, 452 Aldine, Apt. 501 - CHICAGO, Illinois 60 657 (10 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 10 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 3-4 de 1979, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

Le retard apporté à la parution de ce numéro de *Kulturaj Kajeroj* me permet de donner une idée assez précise de la saison d'été à Grésillon. Le mois de juin a été décevant, une partie des passages ou stages annoncés n'ayant pas eu lieu pour des raisons diverses. Mais l'été s'annonce favorable.

Pendant la première période, le nombre des participants oscillera autour de 90. Les conférences seront certainement intéressantes et l'activité théâtrale se traduira en particulier par des représentations données, d'une part, par le Pola Esperanto-Teatro et, d'autre part, en avant-première, par TESPA. Le succès des deuxième et troisième périodes sera un peu moindre, mais le nombre des inscriptions est appréciable. Les cours de la deuxième période seront sans doute bien suivis, mais il est difficile de savoir très précisément si la formule « photo - danse » de la troisième période aura le succès que nous souhaitons ; nous savons, par expérience, que c'est sur place que beaucoup de participants se déterminent. Des investissements nouveaux ont été faits et le laboratoire de photo est maintenant bien équipé. Le responsable du cours, Willy Grela, a une expérience suffisante non seulement de l'art photographique, mais aussi de la pédagogie de ce genre de cours pour que toutes les chances soient données à ceux qui suivront cette activité d'apprendre et de pratiquer la photographie. Toutes les activités auront évidemment lieu en espéranto. Nous savons bien aussi qu'on ne parle pas que « travail » dans les ateliers. Nous avons le droit d'être optimistes cette année encore.

P. BABIN.

INTER NI

La monato junio iom ĉagrenis nin ĉar grupoj, kiu anoncis sian viziton ne venis. Sed la somero anonciĝas bona. Dum la unua periodo la nombro da partoprenantoj estos proksimume de 90 personoj. Krom la « internaj » teatraj aktivaĵoj pola Esperanto-Teatro kaj poste TESPA prezentos programojn. La dua kaj tria periodoj akceptos iom malpli da restadantoj ol la unua sed la nombro da aliĝoj kaj informpetoj estas kontentiga. Ni ankoraŭ ne scias ĉu la foto-kurso estos bone ĉeestata ; plej ofte, nur surloke, la homoj decidas pri la kursoj sekvotaj. Sed ĉi jare denove ni aĉetis materialon por ankoraŭ pli bone ekipi la foto-laborejon. La kursgvidanto, kiu profesie instruas fotoarton, kompreneble tute kompetentas. Ni estu optimistaj pri la sukceso.

FONDUSO « FOTOKOPIILO »

Antaŭa listo :	2059
Schutt	120
Stephan	10
Maillet	100
nova sumo	2289

Voici un nouvel outil pour vous permettre de faire connaître l'ESPERANTO.

UNE APPROCHE DE LA LANGUE INTERNATIONALE

Prix : **5 Fr.**

S'adresser à :

U.F.E., 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris

CONSEIL D'ADMINISTRATION DU DIMANCHE 24 JUIN 1979, A GRESILLON

La séance est ouverte à 10 heures, sous la présidence de M. Babin, président.

M. Bodereau Marcel est élu secrétaire.

Présents : MM. Babin, Bénistant, Bodereau, Boyer, Ciret, Dairon, Jellenc, Mathé, Métivier, Mme Prévost.

Absents excusés : MM. Chevallier, Guillaume, J.-P. Guillot, Mme Micard.

L'ordre du jour proposé par M. Babin sur la convocation est adopté.

Le président passe en revue les stages de mai et juin. Sur cinq stages prévus, trois n'ont pas eu lieu pour des raisons diverses. Le séjour de une semaine d'un groupe de Hollandais a été annulé quatre jours avant la date du stage. Un stage F.O. régional n'a pas eu lieu et un stage de l'Université populaire a été, comme en 1978, annulé.

Deux passages scolaires ont été enregistrés, mais il a été constaté que l'encadrement laissait à désirer ; quant à la tranquillité de la nuit, bruits, galopades, etc. empêchaient de dormir. L'encadrement a simplement constaté et regretté cet état de chose sans y apporter remède. C'est Mme Babin qui a dû intervenir, d'ailleurs avec un plein succès.

STAGES D'ETE. — Les inscriptions enregistrées actuellement se répartissent ainsi : premier stage, 90 à 100 ; deuxième stage, 80 ; troisième stage, 60 environ, mais non terminées. Les responsabilités pour ces stages ont été réparties à la réunion précédente.

ACTIVITES. — Premier stage : conférences. Les titres proposés par M. Boyer : « Kia infaneco signifas infanaron ? », « Neniu estas rajt' sen devo », « La Universalaj devoj de la homoj ».

M. Métivier et Mme Cheverry feront des causeries et des cours seront organisés selon les besoins par Mlle Bourot, Mme Vincent et M. Boyer. L'animation générale, les veillées et l'activité théâtrale seront assurées par Nicolas et Yannick.

Pendant le premier et le deuxième stages, des membres du Théâtre Espérantiste Polonais pourront peut-être, si l'ambassade de France donne les autorisations nécessaires, présenter leur programme.

Troisième stage : il sera axé sur la photographie. Entre le 12 et le 23 août, Franz Swift, de Nouvelle-Zélande, fera des causeries sur la Nouvelle-Zélande et sur les Maoris. Eventuellement, Juanita et M. Boyet et (ou) M. Parisot feront des cours d'espéranto axés sur l'activité photographique. D'autres activités sont possibles : vannerie, par exemple.

Une rencontre d'aveugles et de voyants, à cheval sur le troisième stage, est prévue jusqu'au 10 ou 12 septembre, avec cours d'espéranto pour aveugles et voyants.

● La ville de Baugé invite des responsables de la M.C.E. à participer à un voyage à Kelsterbach, ville jumelée à Baugé. Le voyage est à la charge de la ville de Baugé.

QUESTIONS DIVERSES. — Il est demandé une amélioration de l'aménagement et de l'équipement du laboratoire de photographie : éclairage, étagères, table, écrans interchangeables, produits, etc. L'aménagement pourra être réalisé pendant le premier stage. Quant à l'équipement, il est demandé un programme chiffré. Le Conseil d'administration est d'accord pour une dépense de 1.500 F. environ.

M. Boyer fait remarquer qu'il faut, pendant le stage photo, constituer des équipes pour utiliser le laboratoire, ce laboratoire étant trop petit pour accueillir un groupe important.

Mme Mathé pense que plusieurs groupes peuvent être constitués sans difficulté : travail extérieur, prises de vues, cadrage, promenade photo, montage de diapositives avec commentaires en espéranto, etc.

M. Babin constate que, pendant les stages, le nombre des « spectateurs » est beaucoup plus grand que celui des participants. Beaucoup de stagiaires ne désirent pas participer activement.

POUR 1980. — Il pourra être prévu des stages de photos couleurs avec tirage de copies dediapositives. Le responsable devra établir un programme et une évaluation des dépenses.

PERSONNEL. — Le service est organisé à la cuisine. Les serveuses doivent obligatoirement prendre leur congé hebdomadaire. Une quatrième serveuse est engagée pour assurer ces congés par roulement et participer aux travaux ménagers dans ses temps libres.

AFFICHETTE. — Une affichette sera apposée dans toutes les chembres et dans le hall pour indiquer comment fonctionne la M.C.E. et préciser que ce n'est pas un hôtel. Le texte, laconique, est approuvé.

CATALOGUE DE LA LIBRAIRIE. — Un catalogue a été établi par J.-P. Guillot, mais certains prix ont déjà varié deux à trois fois depuis son édition.

DEFINITION DES DIVERSES TACHES DE GESTION DE LA M.C.E. — Le nombre des responsables est trop réduit. C'est un danger pour l'avenir en cas d'empêchement quelconque et brutal. Il y a nécessité de répartir davantage les tâches. M. Babin en donne un aperçu.

M. Jelenc demande que soit précisées les attributions du président, du trésorier et du secrétaire.

M. Babin établira une liste des tâches dissociables pour essayer de les répartir lors d'une prochaine réunion.

PREPARATION DES ELECTIONS DE 1980. — M. Guillaume ne se représente pas. Certains administrateurs ne viennent plus aux réunions.

Mme Vincent et M. Le Magadure Frédéric seront candidats.

Pour démocratiser le vote et ne pas grouper tous les bulletins dans une ou plusieurs mains, le vote aura lieu par correspondance pour tout le monde (y compris les présents à l'Assemblée générale).

Il sera fait appel aux candidatures.

TRAVAUX DIVERS. — Il faut envisager le curage du ruisseau en amont de l'étang. La question est à étudier.

L'ordre du jour étant épuisé, la séance est levée à 12 h. 45.

Le Secrétaire :
BODEREAU Marcel.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	0,80
couleur	:	1,00
Cuillères de collection	:	15,00
Pendentifs	:	15,00
Pendentifs grosse étoile	:	25,00
Coupe-papier	:	25,00
Disques de stationnement	:	5,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	3,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 20 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de P. Babin

Prix : **18,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE

CATALOGUE

...aujourd'hui

LA PLENA ILUSTRITA VORTARO

Un outil indispensable pour apprendre et pratiquer la langue internationnale